# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 21. Aprilo 13, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**


## Turisma sukceso denove en Nepalo

La partoprenintoj inkluzivas unu personon el Kanado, 2 el Suda Koreio kaj 4 el Japanio; ĉiuj aliaj estis nepalanoj. La ĉi-jara programo celis inviti esperantistojn de ĉiuj aĝgrupoj ĝui mondfamajn lokojn de Nepalo kaj samtempe antaŭenigi la enlandan Esperanto-movadon. Dum la ekskurso, partoprenantoj kuraĝigis homojn lerni Esperanton kaj interŝanĝi ideojn kaj sciojn, kaj konigi sian propran kulturon.

La programo komenciĝis la 26-an de februaro kun akceptado de la gastoj, kiujn NEspA formale bonvenigis en la vespero de la 27-a en Marsyangdi hotelo en Thamel. La prezidantino de NEspA s-ino Indu Devi Thapaliya, la ĉefo de la renkontiĝo, s-ro L.P. Agnihotry, d-ro Mukunda Raj Pathik, s-ro Philip Pierce kaj la speciala gasto sro Hori Yasuo deziris sukceson al la renkontiĝo. Ankaŭ parolis la 90-jara kaj tamen ankoraŭ tre vigla partoprenanto s-ro Yamamoto Akiya. Estis iom emocia okazo, ĉar la plimulto el ni ne renkontiĝis post la komenco de la pandemio. NEspA ricevis bondezirmesaĝojn el diversaj partoj de la mondo".

La dekunutaga programo komenciĝis kun du tagoj dediĉitaj al vizitado de Katmandu valo. Ni unue iris al la sanktejoj Pashupatinath kaj Baudhanath. La grupo veturis al la dua historia urbo de Nepalo, Patan, renomata pro ĝia nevara etno kaj ties elstara kulturo. Samtage la grupo vojaĝis al Daman esperante ke tie la himalaja montaro estos videbla, sed tiu ĉi restis vualita pro malbona vetero. La sekva etapo kondukis nin al *Chitwan* nacia parko, kie oni restis du noktojn. Ĉeestantoj ĝuis ĵipan rond-vojaĝon, boatadon, kulturan programon kaj aliajn agadojn. Ni vidis rinoceron de tre proksime en ties natura loĝloko. Nia tranoktado estis en privataj domoj (tiel nomata hejmrestado). Grupanoj tial povis vere ekkoni vivmanieron malsaman ol la al sian: la manĝaĵojn, vestaĵojn kaj aliajn aspektojn de nepalaj vilaĝoj.

En la 4-a de marto ni alvenis en la turisma urbo Pokhara. Dum du tagoj ni turismis en kelkaj el ties famaj lokoj. Ni boatis en ĝia bela lago kaj vizitis diversajn vidindaĵojn. La vetero dum la 6-a de marto estis bona, kaj ni veturis do al monteta kresto superrigardanta la valon por vidi la montaron de tie inkluzive la mondfamajn montojn Machhapuchhare, Annapurna kaj Dhaulagiri. Forlasinte la urbon Pokhara, ni atingis

la historian urbon Gorkha post la matenmanĝo. Tio estis la unua fojo dum niaj Renkontiĝoj ke ni vizitis tiun ĉi lokon. Gorkha situas en monta regiono en la samnama distrikto. Ĝi ludis gravan rolon en la fondado de moderna Nepalo. Tie naskiĝis la reĝo Prithvi Narayan Shah, kiu unuigis la nunan nacion. Ankaŭ de tie venas multaj el la mondfamaj Gurkaj soldatoj, kaj tie estas la sidejo de la brita Gurka-armeo. Gorkha palaco, situanta je 1.000 metroj super la marnivelo, estis konstruita en la 16-a jarcento. En la 27-a de marto ni revenis al Kathmandu.

En la 8-a de marto okazis adiaŭa vespero en la halo de Marsyangdi hotelo, finiĝante kun vespermanĝo. Ĉiuj parolantoj sincere dankis al la organizantoj pro la Speciala Ekskurso. Ĉeestantoj ĝuis la diversajn aĵojn kiujn s-ro Hori Yasuo kunportis el Japanio por montri al ni. Atestiloj estis disdonitaj al la partoprenintoj de la ekskurso. Ĉiuj eksterlandaj gastoj esprimis kontenton pri la vojaĝo kaj pri tio, ke ĝi estis planita por ke ankaŭ maljunuloj povu aliĝi.  Finfine ni dankas ĉiujn organizojn, individuojn kaj partoprenintojn, kiuj kontribuis al la sukceso de la ĉi-jara Speciala Ekskurso.

Bharat Kumar Ghimire

# Flugiloj de facila vento

De: **lowenstein, anna** <anna.lowenstein@esperanto.org>

https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/esperantistoj-ekskursis-en-nepalo-r356/

# Fortalezo akceptas kvar kongresojn

Tiu brazila urbo jam gastigis Universalan Kongreson en 2002. Daŭras la kongresemo, en tiu urbo plej facile atingebla el Eŭropo.De la 2-a ĝis la 5-a de novembro 2023 en Fortalezo (Brazilo) samtempe okazos kvar kongresoj: La 10a Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE), la 57-a Brazila Kongreso de Esperanto, la 41-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, 8a Cearaa Kongreso de Esperanto. La kongresa temo estas “Homaj rajtoj, solidareco kaj memdetermino de popoloj”. Legu pli en la novaĵretejo ‘La Ondo de Esperanto’:
https://sezonoj.ru/2023/03/ameriko-2/

# Denove eŭropa kongreso en 2024

Mi hodiaŭ deziras sendi al vi bonan novaĵon kaj samtempe inviton por speciala evento kiu okazos **en 2024 en Strasburgo.**

Germana Esperanto Asocio (**GEA**) kaj Unuiĝo Franca por Esperanto (**UFE**) decidis kune kongresi en 2024 en Strasburgo. (Antaŭaj komunaj kongresoj okazis en Germanio en Kaiserslautern en 2010 kaj Zweibrücken en 2018).

Sed ĉar Strasburgo estas ankaŭ unu el la ĉefurboj de Eŭropaj instancoj, ni deziras pligrandigi la kongreson invitante aliajn landajn asociojn de Eŭropo por ke estu vera **Eŭropa Kongreso!** EEU kaj UEA jam anoncis siajn aprobon kaj subtenon. Pro tio mi deziras proponi al via asocio partopreni la kongreson : invitante siajn membrojn, proponante programerojn kaj okazigante laborkunsidojn, kaj ĉiuj aliaj ideoj studendaj !

La kongresejo estos la Universitato de Strasburgo kiu pozitive respondis al nia peto.

La kongreso okazos de **merkredo la 8-a ĝis dimanĉo la 12-a de majo 2024**, inkluzivante la 9-an de majo kiu estas tago de Eŭropo kaj feritago en diversaj landoj pro tio, kaj pro la fakto ke, en 2024, estos ankaŭ tago de ĉielira festo. Ni esperas ke via partopreno eblos kaj senpacience atendas vian reagon pri tiu propono.

Bruno Flochon, *Prezidanto de Espéranto-France (UFE)*

# Marcel Leereveld atingis 105 en Aŭstrailio

Li ekvivis la 4-an de decembro 1917 – kaj mortis la 21-an de marto 2023: 105 jarojn aĝa.Do mi povos ankaŭ vidi, el la ĉielo, kiel eble du aŭ tri miaj multaj post-venontoj ĉagrenos kaj koleros, ĉar mi donis en mia testamento malpli al ili ol ili atendis kaj postulis. Kaj mi vidos kiel miaj amataj postvenantuloj pro neceso forĵetos, kiel malmodernaĵojn kaj nun ne utilajn, preskaŭ ĉiujn karajn librojn miajn, centojn da ili, en pli ol dek lingvoj, ankoraŭ legendajn de mi, kaj novajn, aŭ preskaŭ, vestaĵojn, dekojn da ili, nun konsideratajn malmodernaj sed kiujn mi intencis ankoraŭ surmeti dum miaj samfamilianoj intertempe aĉetis por mi pli modernajn, ne pli bonajn aŭ belajn. kiel sendi enmigremulojn al kruelaj insuloj aŭ fari militon en Irako kaŭzantan grandegan mortintaron. Malagrabla antaŭvido!

Marcel Leereveld

El la retejo de la Melburna Eo-Asocio: Unu el niaj membroj, Marcel Leereveld, antaŭ la retiriĝo, estis la ĉefa ekzamenisto de Esperanto en Aŭstralio, kaj pro tio verkis diversajn gramatikajn librojn. Lia definitiva gramatika libro “Lingvaj Resondoj” estas akirebla de la Melburna Esperanto-Asocio, au elŝulteblael nia retejo. Ni prizorgas bibliotekon de esperantai libroj, kaj krome diversajn objektojn de historia valoro.




https://www.esperanto.com.au/

# Aminda ricevinda

La ELSENDO N°129 de Aminda Radio Esperanto proponas al sia aŭskultantaro la duan kaj lastan parton de sia artikolo pri la hegemonio de la etno Sakalava dum la 19-a jarcento. Kelkaj novaĵoj en Malagasio dum la kuranta monato sekvas tion. Nia rubriko pri kulturo prezentas al vi la originale verkitan Esperanto-novelon La ŝuld-premego» kaj iu kanto de Brassens interpretita de Jacques Yvart ilustras la finon de nia podkasto. Aminda Radio Esperanto estas la ĝisnuna unika Esperanto-podkasto el Afriko, ni bezonas vian financan helpon por la plua ekzistado de nia retradio. Bv ĝiri vian kontribuon al la UEA konto «fidi-d» (kun la mencio Aminda) aŭ per «paypal.me/paiementahenriel». Aminda Radio Esperanto bondeziras per:

https://youtu.be/DsOIMdiFcLc

# Instruista Ligo en Ganao

Mi kiel Landa Reprezentanto sukcese parolis kun jenaj esperantistoj kiujn mi konas en Ganao por ke ni kunlaboru kaj oficiale stariguteamon de Instruantoj en Ganao.

Plue, ILEI Ganao jam estis registrita de mi kaj s-ro Mensah. Jen nomoj kaj retadresoj:



Nomo, Retadreso

1. Alfred Kobina ARTHUR,ctrcgh@gmail.com
2. Paul Kwesi MENSAH, paulmensah58@hotmail.com
3. Joseph BOATENG; joeboat2022@gmail.com
4.Louis NICHOLSON, louisnicholson@gmail.com
5. Anthony Appianda ARTHUR , anthonyappianda@gmail.com
6. Gift Michael DZOXENU; mickthegift@gmail.com

Mi jam havis diskuton kun direktorino pri edukado en regiono Korle Klottey kie oni bonvenigas instruadon de Esperanto en mezlernejoj kiel Klubo unuafoje kaj preskaŭ unu horo semajne. Mi ĝis nun ne akiras oficialan aprobon sed mi sekvos la diskuton ĝis la finfina aprobo. Mi aldonis foton.

Alfred Kobina ARTHUR, Ganao

# IKEF aktiva en suda Azio

Mi jam vizitis Iranon trifoje kaj Uzbekion kelkfoje. Mi konfesas ke la Novroza regiono estas unu el plej antikvaj civilizaciaj regionoj kunligitaj de Silkvojo tra Eŭrazia kontinento, kaj en la Novroza regiono restas multaj mondfamaj vidindaĵoj, kiuj estas vere vizitindaj en la mondo. Mi esperas ke IKEF povos organizi turismajn karavanojn al la rozbela regiono kunlaborante kun lokaj IKEF-anoj kaj esperantistoj, ekzemple, ĉi-jare oktobro okazos la centrazia kongreso de Esperanto en Taŝkento, Uzbekio, organizota de Uzbekia Esperanto-Asocio kaj uzbekia filio de IKEF, kaj nia IKEF planos sendi al la kongreso sian delegacion. Ĉu vi deziras aliĝi al nia delegacio? Kontaktu min; mi atendas.

Chielismo WANG Tianyi, Prezidanto de IKEF, Reto: chielismo@hotmail.co

========= vortoj: 1410 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php por 2023 (ĝis 20.).

Aliaj Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.